3-a JARO, N-o 41 APERAS MONATE MARTO 1936

# SUR POSTENO

**OFICIALA ORGANO DE INTERNACIO DE PROLETA ESPERANTISTARO**

**REDAKTEJO-ADMINISTREJO : Bourse du Travail, 14, rue Pavée — NIMES (Gard) — Francio.**
**IPE-Oficejo : K-do S. J. SMITH, 36 Womersley Road, LONDON (Britio).**
**IPE-Centro : K-do H. HOMO, Postbox 305, LENINGRAD (U S S R).**
**Internacia PEK-Centro : K-do B. TURNER, Dundeestr. 60, EDINBURGH (Britio).**

# MARŜPRETAS UNUECA FRONT'!

Estas ĉie konate, ke el la centraj esp-organizoj, IPE estas la sola, kiu senlace tamburas inter la proletaj esp-istoj por unuecfronta laboro. Ĝi respondas per tio al la forta, unuecema volo, kiu esprimiĝis per pasiaj diskutoj k « dramecaj scenoj » dum la lasta SAT-kongreso, per fratecaj debatoj k signifaj decidoj dum la kongreso de IPE, kiun ĉeestis 3 membroj de SAT.

IPE faris tre konkretajn proponojn pri farendaj paŝoj laŭ unueca fronto, kiujn ĝi publikigis en SP 31. Ĉiu n-o de SP poste enhavis instigojn k alvokojn al unuecfronta kunlaboro. La SP-redakcioj alvokis komuniki eĉ plej etajn detalojn pri jam efektiviĝintaj kuniĝoj, pri unuecfrontaj intertraktoj.

Okazis la 2-a IPE-kongreso, dum kiu libere la k-doj el SAT diskutis k proponis pri unueca fronto. Estis elektita Unueciga Komisiono de la IPE-kongreso, kiu tuj komencis funkcii. En n-oj 37-38 de SP aperis la plenaj diskutoj pri unuecfrontaj demandoj dum la IPE-kongreso.

IPE direktivis al ĉiuj siaj landaj organizoj intensivan agadon por evoluigi larĝan, unuecfrontan kampanjon. La naciaj organoj k bultenoj de IPE en Belgio, Britio, Francio, Nederlando, Svedio tre klare k pozitive reliefigis la manieron de unuecfronta agado laŭ la specifaj kondiĉoj koncernlandaj. Nenin diskuto okazis en IPE pri la « ĉu », -streĉa aktivado akcelis nur al la « kiel » en unuecfronta agado.

SP 39 denove komunikis diversajn dokumentojn, kiuj tuŝis unuecfrontajn problemojn. Ĝi plenumis per tio la intertraktan promeson, kiun IPE donis al sia ĉefa (k dume sola) kontraktanto SAT. IPE ne nur « ekzamenis » aŭ « studis », sed agadis k kuraĝige alvokis la proletajn esp-istojn forjeti ĉiun disigajon, kiom ajn granda ĝi estu, por kapti eĉ plej etan, plej detalan faktoron, kiu povus unuecigi la proletajn mondlingvanojn.

Dume la SAT-PK ŝajne ĉefe atendas sukcesojn de la plenumo pri pli malpli signifaj formalaĵoj. Cetere la komunikoj de la SAT-PK radias imit-aristrokatan retiriĝemon, tute ne motivitan.

SAT ĝis nun ne unufoje alvokis tiujn organizojn, kun kiuj ĝi estas tre intime ligita per la Gotenburga konvencio. Ĝi ne kritikis, des malpli protestis ekzemple ĉe la Nederlanda Federacio de Laboristaj Esp-istoj (NFLE), kiam ties organo, tuj post la SAT-kongreso en Parizo, en blinda maltrankviliĝo elpuŝis jenajn frazojn (senkomente recititajn) :

*
**

« La plej gravajn diskutojn kaŭzis la propono pri formo de unuecfronto kun IPE. Ĉi tiu propono influis debatojn k regis dum la tuta kongreso. Kvankam la plimulto el la kongresanaro konsciis pri la danĝero forlasi la supertendencan starpunkton de SAT, ĝi ne sufiĉe forte k energie kontraŭis al la klopodoj de kelkaj fanatikaj SKISMIGULOJ (substreko nia, R.), kiuj sukcesis treni la debatojn, k per tio kaosigi la kongreson. Anstataŭ rapide k principe solvi la aferon, atentigante la bazon k strukturon de SAT, kiuj ebligas al ĉiuj tendencoj aliĝi k kunlabori en la kadro de mondorganizo, ĝi tro rapide k tro multe cedis al sin nomantaj « revoluciuloj », kies klopodoj k intencoj nur povas konduki SAT-on al likvido k pereo. La fakton, ke oni decidis sendi leteron al IPE k delegitaron al IPE-Kongreso oni nur povas klarigi per tio, ke la kongresanojn fine tedis la daŭra klaĉado k ke oni ne sufiĉe klare antaŭvidis la konsekvencojn, kiujn povas havi la akcepto de tia unuecfronta propono en la propagando k varbado de SAT. Ĉi tiu cedo al komunistemaj k-doj estas neniel pravigebla k endanĝerigas nian mondorganizon k malfavorigas la porSAT-an varbadon. »

Oni nur povas supozi ideologian konsenton ĉe SAT-PK pri la sinteno de organizo k ties organo, kun kiu ĝi havas tre intimajn rilatojn... se oni ne volas kredi, ke i. a. NFLE pro konsiderinda, financa subteno al SAT (*) rezervas al si agnoskon pri siaj propraj, ideologiaj postuloj.

Tra la folioj de la SAT-organo SEN-ULO mem glacias frosta repuŝemo al unuecfrontaj demandoj. Anstataŭ alvoki, kuraĝigi, interproksimigi la proletajn esp-istojn, ĝi rezignacie k lace rilatas al la temo, cedante parolrajton al homo kia Lanti, kiu rezonante pri « Principoj de Unueco » vekas la saman farsan efikon, kiel buĉisto, oratoranta pri vegatarismo. Anstataŭ vigle, iniciateme k kamaradece tuŝi urĝan aferon SEN-ULO per okazaj rimarkigoj penas ne nur dubindigi sian kontraktanton IPE, sed dubindigi la tutan unuecfrontan movadon, provante tiel kvitigi sin de la respondeco, kiun ankaŭ ĝi havas.

Ĝuste tiuj rimarkigoj en SEN-ULO decidigis la IPE-OFICEJON senpere sin direkti al SAT per jena letero :

*
**

Al SAT *Parizo* London, 22. 1. 1936.

Karaj kamaradoj,

En lastaj n-oj de *Sennaciulo* aperis diversaj aludoj ĉefe pri IPE k ties sinteno al unueca fronto de proletaj esp-istoj. Tiuj aludoj (al kiuj ni respondos en SP) kelkfoje fuŝe pritraktas diversajn aferojn.

En *Sennaciulo* n-o 436 denove aperis sur paĝo 16 sub « Komunikoj de la Plenum-Komitato » i. a. jena rimarkigo :

« Simpla konstato : Ĝis hodiaŭ (23.XII) ankoraŭ ne okazis la promesita publikigo de nia leterinterŝanĝo kun IPE en la oficiala IPE-organo... »

Kion la leganto konkludu el via « konstato » ? Ĉu timon, aŭ eĉ saboton ĉe IPE rilate al tia publikigo ? La ironiaj tri punktetoj post la artikolo tiurilate ja nur povas estigi aŭ fortigi « dubemon », malfavore al IPE.

Mi povas certigi al vi, ke la koncerna publikigo laŭ propra volo de la IPE-anaro okazos en *Sur Posteno*, same kiel en ĝi ankaŭ aperis la kongresdiskutoj faritaj en ANTVERPENO pri unueca fronto, ĉu pozitivaj, ĉu negativaj por IPE.

Ke ĝis nun nomita publikigo ne okazis, kaŭzis... (sekvas konciza indiko pri la kaŭzo, kiun ni ellasas tie ĉi), kiu malhelpis k poste malebligis tiel ĝeneralorganizan, kiel la redaktan laborojn...

Petante vin ne publikigi la kaŭzon de la malfunkciiĝo de IPE-O ni samtempe esperas, ke estonte vi ne plu subkomprenigos en *Sennaciulo* kvazaŭ IPE-anojn k IPE-instancojn direktus malbona volo aŭ malicaj intencoj, se vi tute ne aŭ malbone konas la faktojn.

Kun unuecfronta saluto.

*Por IPE-Oficejo, London* : A. RESPE.

Post tio estis silento k nur post preskaŭ unu monato alvenis la respondo. Evidente SAT-PK atendis la aperon de nova *Sur Posteno* k... jam, ĝi trovis « nerefuteblan » argumenton, ke IPE... bojkotas la unuecfrontan movadon, kiun IPE mem iniciatis k kiun IPE-sekretariaro direktivis kiel la « ĉefa, aktuala problemo » por ĉiuj IPE-organizoj. Pro kio SAT-PK tion eltrovis ? Ni legu mem.

Al IPE-Oficejo

Paris, 19. 2. 1936.

Kamaradoj,

Via letero de 22. jan. 1936, subskribita de A. Respe, trafis nin.

Ni notas vian novan adreson.

Pro nia aludo, en *Sennaciulo* n-o 436, pri nepublikigo ĝis 23. dec. 1936, fare de IPE, de la korespondaĵo interŝanĝita, vi parolas pri... « saboto ĉe IPE... »

Ni konfesu, ke ni ne pensis atribui al IPE tian intencon pri sabotado... ĝis kiam ni ricevis la numeron 39 (jan. 1936) de *Sur Posteno*.

Ja ni konstatas, ke inter la « *Dokumentoj pri Unueco* » (paĝoj 2 k 3) mankas :

— a) la letero sendita la 1. okt. 1935 de IPE Leningrad al SAT k kiu aperis en novembra *Sennaciulo* (kaj strange, vi presigas la leteron de SAT kiu respondas al tiu mankanta letero de IPE).

— b) la letero sendita la 27. dec. 1935, de SAT al IPE Leningrad, — k kies kopion ni sendis, samtage, al k-do *Malfère*, Paris-Montrouge.

Kial *Sur Posteno* ne konigas tiujn du dokumentojn al sia membraro ? Ĉu do pro tio, ke ili estas la plej gravaj el ĉiuj ? Ĉu ĝuste pro tio, ke la letero de IPE-Leningrad, de 1. oktobro 1935, karakterizas la koncepton de IPE pri UNUECO ? Tamen tiu letero de IPE ŝajne harmonias kun la Rezolucio de ĝia Antverpena Kongreso (vidu punkton 9-an de tiu rezolucio). Tiu letero de IPE estas nek pli, nek malpli ekskluzivema ol ĝia Kongreso...

Kie do troviĝas la « sabotantoj de la unueco », se ne en via rondo ?

Tamen, oni povus ja supozi, ke absoluta unueco ne regas eĉ en via propra organizo. Ja ĉu la letero, de 15. dec. 1935, de la pariza Komisiono (presita en januara *Sur Posteno*, 3-a paĝo, 3-a kolono, sub « *Noto* ») ne implicas iel malaprobon al la « propraj konsideroj » de IPE-sekretariaro ? Ĉu tiu opini-malsamo ne eksplikas la nepublikigon de la letero de 1. okt. 1935 ? Nu, pli klara, pli pozitiva estus la traktado se vi, antaŭ ĉio, jam akordus pri la problemo en viaj propraj vicoj.

Kaj jen nun k-do *Bubu*, unu el la komisiitoj de la Antverpena Kongreso (en *Proleta Esperantisto*, januaro 1936, paĝo 3, kolono 3) akuzas nin pro... « nepublikigo de la IPE-proponoj por unueco... » kaj pro... « aperigo de ĉio, kio povas daŭrigi la disecon en la proleta esperanto-movado... »

En la sama *Proleta Esperantisto*, k-do Bubu klaĉas, ke ni « rifuzis » kontakti kun la 3-membra komisiono pariza de IPE. Tiel agante li tordas la veron : ni respondis simple, ke ni ne vidas utilon trakti rekte kun tiu Komisiono, ĉar ja ni jam rilatas kun instanco supera al tiu Komisiono, nome kun la Centro de IPE Leningrad. Kaj nia procedo cetere konformis al la « Oficialaj Informoj de IPE-Sekretariaro », (1-a paĝo de *Sur Posteno*, januaro 1936). Kial do k-do Bubu ne citis la veran motivon, vortigitan en nia letero de 27. dec., al la sekretario de la Komisiono.

Cetere kun bonvolemo ni ekzamenos la eblon havi iun tagon intervidiĝon kun la tri komisiitoj de la lasta IPE-Kongreso.

Tio dirite, ni salutas vin sennaciece.

*La Prezidanto de PK de SAT* : BANNIER.

(*) Laŭ lasta jarraporto de NFLE (por 1935) estis liveritaj al SAT por SEN-ULO fl. 2.303.50.

# Informoj el Polio

## ĜENERALA INSTRUADO EN POLIO

Elementa instruado en Polio devas esti laŭ leĝaj decidoj ĝenerala, ĝi devigas ĉiujn infanojn de la 7-a jaraĝo kaj por ĉiuj devas esti akirebla. Ĉiu do infano en Polio teorie devas fini almenaŭ komencan lernejon.

La elementa instruado devas daŭri sep jarojn, dum kiuj la infano finas sep klasojn. Tamen jam post la fino de sesa klaso, se la infano volas kaj havas eblojn plue studadi (tio dependas de financa stato de ĝiaj gepatroj ĉar la plus studado estas pagata), ĝi povas transiri al meza lernejo ĝenerale kleriganta (gimnazio) aŭ al ia profesia lernejo. La infano, kiu ne povas lerni plue transiras al sepa klaso kaj finas la elementan ĝeneralan lernejon. En tiuj lernejoj devas instruadi sep geinstruistoj.

Tiel aspektas la instruado ĝenerala en Polio, sed nur en teorio, praktike estas « iom » alie.

En urboj fakte ekzistas lernejoj sepjaraj, kun sep geinstruistoj. Tiujn lernejojn oni nomas « lernejoj de tria grado ». La lernado estas deviga, sed en lernejoj mankas loko por ĉiuj infanoj. La elementa lernado estas senpaga, sed ekzistas diversspecaj « libervolaj » pagoj, kiuj tamen sumas tre multe.

En urbetoj kaj en pli grandaj vilaĝoj ekzistas t. n. « lernejoj de dua grado ». Tie instruas nur kvin, kvar eĉ tri geinstruistoj. Ili estas devigataj instrui tiom, kiom sep geinstruistoj.

Plej malbona instruado estas en malgrandaj vilaĝetoj. Tie aŭ tute ne estas lernejo, aŭ estas « lernejo de unua grado ». Kiel aspektas tia lernejo ? En ĝi instruas unu, aŭ plej multe du geinstruistoj. Mi mem instruas ĝuste en tia « lernejo », do mi scias plej bone kiel ĝi vere aspektas.

Plejparte ĝi havas ejon en malnova vilaĝa kabaneto kun unu lerneja ĉambro kaj kun loĝejeto por instruisto. Lerneja ĉambro en kiu mi instruas havas 36 m2 da supraĵo. En ĝi troviĝas 49 infanoj je la unua matena kaj 50 je la dua posttagmeza ŝanĝo. Kvankam la lerneja statuto antaŭvidas por unu instruisto plej multe 60 infanojn, mi instruas fakte 99. La instruisto en t. n. « unuklasejo » devas plenumadi la samajn taskojn kiel kvar geinstruistoj ĉe « triagrada lernejo ». Li tamen ricevas salajron egalan al salajro de unu instruisto en lernejo triagrada kaj kelkfoje eĉ malpli. (La salajro egalas al 160-130 zlotoj monate). Ĉu estas eble ke unu instruisto laboru same fruktedone kiom kvar eĉ se li ricevus proporcian salajron ? Neeble !

Instruisto laŭ lerneja statuto devas lernigi 30 horojn semajne, 5 h. tage. En urboj ĉiu instruisto efektive havas nur unu klason. Li instruas kvin horojn, do li havas eblojn lernigi sufiĉe bone. Instruisto en « unuklasejo » havas 4 klasojn, kiujn devas instrui samtempe po du en unu ĉambro je du ŝanĝoj. Se li volas, ke liaj infanoj iom scipovu — oni ja devas zorgi pri tio — li devas labori meznombre 7 aŭ eĉ 8 h. tage. Estas instruataj kune kvara kaj tria klasoj kvar aŭ kvin horojn, kaj poste dua kaj unua klasoj dum du aŭ tri horoj.

Estas superflue diri pri peza laboro de instruisto en tiuj « unuklasejoj ». Li laboras kvaroble pli ol la instruisto en la lernejo de dua aŭ tria grado, sed se li ne scipovos fari ĉion laŭ programo, la lernejestraro opinias, ke la kulpo estas nur lia pro « ne fruktedona » laboro. La instruisto do faras ĉion, tamen li ne estas kapabla elĉerpi destinitan programon.

Ni do vidas, ke elementa kaj ĝenerala edukado en Polio ekzistas nur sur papero. La vilaĝa lernejo ne povas pli multe ellerni infanojn ol iom legi, iom skribi kaj malbone kalkuli. Nia reakcia registaro celas evidente por ke niaj kamparanoj nenion pli povu scii, ĉar malklerulojn oni ja pli facile povos

*(daŭrigo je la piedo de l' tria kolono).*

## EL LERNEJA VIVO EN POLIO

Regas ĉe ni leĝo, ke lernejestroj tre zorgu pri spiritostato de ordinaraj geinstruistoj. Estroj de popolaj lernejoj devas sekrete noti konduton de instruistaro kaj raporti ĉion al pli altaj lernejaj instancoj. Ĉiu instruisto troviĝas sub observo. Aŭtune de pasinta jaro ĉiuj lernejestroj el nia distrikto havis kunvenojn kun s-ro inspektoro distrikta kaj ĉi tie ili estis informitaj pri diversaj aferoj tute ne kunligitaj kun pedagogio. Poste lernejestroj grave kaj sekrete komunikis al geinstruistoj ke al iliaj devoj apartenas ankaŭ vekado de amo, estimo kaj obeemo de junularo al ĉiuj ŝtatestroj. Infanoj devas ami kaj respekti polajn ministrojn, ĉar ili « savas patrion » kaj multe laboras por ĝia bonstato. Tiel parolis lernejestroj laŭ ordonoj de distrikta inspektoro. Tie nomiĝas ĉe ni edukado de junularo.

Mi modeste rimarkis, ke niaj potenculoj plejmulte certe zorgas pri pligrandigo de siaj salajroj, ĉar bonstaton de popolo neniu vidas en Polio kaj tio pruvas, ke niaj ŝtatestroj ne laboras por « patrio » — sed nur por siaj poŝoj. Pro tio ili eĉ pligrandigis siajn salajrojn ĝis 6.000 zlotoj ĉiumonate, krom aliaj enspezoj. Oni diras, ke polaj ministroj ricevas pli grandan salajron ol prezidanto de franca respubliko. Ĉe ni la ministroj estas pli grandaj sinjoroj ol sveda reĝo, kvankam kondiĉojn de vivo de pola popolo oni ne povas eĉ kompari kun kondiĉoj de sveda.

Miaj modestaj vortoj tre kolerigis lernejestron kaj li, ne sciante kion respondi, riproĉis al mi, ke mi estas kontraŭŝtatulino kaj li avertis min ankaŭ, ke mi povus pligrandigi la rondon de polaj senlaboraj geinstruistoj.

« Por bono de patrio », mi respondis, sed lernejestro interrompis, dirante, ke nia geinstruista tasko estas nur plenumado de ĉiuj donitaj al ni, ordonoj.

Nun polaj geinstruistoj ne povas pensi, ili devas nur plenumadi ordonojn... Tiel aspektas libera penso en Polio.

Nun inter ŝtataj instruistoj kaj vilaĝanoj daŭras konstanta pli aŭ malpli granda, kvankam kaŝita, batalo pro infanoj. La instruistoj parolas al infanoj en lernejoj pri nobleco de « savintoj de patrio », kiuj regas nun en Polio, sed hejme la infanoj aŭdas kaj vidas alion. Ili vidas mizeron, grandajn impostojn, maljustecon de regantaj klasoj kaj diversajn mensogojn. La sinceraj infanoj, kiuj diras en lernejo siajn pensojn estas punataj de instruistoj, pro tio ili fariĝas flatemaj, mensogemaj kaj cinikaj. Por kontentigi s-ron instruiston infanoj mekanike ripetas frazojn, kiujn ili eĉ ne komprenas, ĉar indiferente estas por infanoj, kiu savis patrion — interesas ilin nur fluanta tempo.

Unufoje mi legis al miaj infanoj pri pola prezidanto kaj mi montris al ili bildeton kun la prezidanto en aŭtomobilo. « Nia s-ro prezidanto estas burĝulo — diris unu lernanto — kian belan aŭtomobilon li havas ! » — « Li malbone regas en Polio, li estas amiko de riĉuloj », diris alia knabo. Tion certe ili aŭdis hejme de siaj gepatroj...

Tiajn vortojn aŭdas nur la instruistoj, kiuj permesas al lernantoj libere esprimi siajn pensojn. En unu najbara lernejo distrikta inspektoro dum vizitado demandis infanojn, ĉu ili amas Marŝalon Pilsudski. Ne ! ekkriis lernantoj. Pro tio la instruisto estis senoficigita kaj nun li estas senlabora.

Tiaj okazintaĵoj kaŭzis, ke nun la edukistoj ĉiutage instruas la infanojn, kion ili devas respondi, kiam alvenos lerneja inspektoro.

Por efektiva instruado mankas tempo kaj gepatroj plendas, ke la instruistoj rakontas al infanoj malsaĝaĵojn anstataŭ instrui veron.

La vero estas malpermesita en polaj lernejoj kaj pro tio Polio proksimiĝas al mezepoko.

*Instruistino.*

## LA SORTO DE POLA KAMPARANARO.

Larĝe kaj malproksime etendiĝas verdaj spikaroj. Ĉirkaŭe sur horizonto estas rimarkeblaj arbaroj envolvitaj en blueta nebuleto. Ĉiuj kampoj kaj arbaroj estas propraĵo de grafo Krasicki. Sur montpintoj (1), kie la tero estas tute malbona, estas kamparanaj grundoj. Ankaŭ kamparanoj povas esti « riĉuloj ». Ili havas krom kabanon 2 aŭ 3 bovinojn kaj eĉ ĉevalon !

Hima estas malriĉa. Li posedas nek ĉevalon, nek bovinon. Sed li havas grundon. Jes ! Li havas eĉ 1/2 morgon (ĉirkaŭ 1/4 ha) da tero. Tie povas kreski nur tro malgrandaj terpomoj, aŭ aveno. Pasintjare estis terpomoj. Ĉi-jare li devas tie semi avenon. Grenon li havas, ĉar por ŝpari ĝin li ne manĝadis jam de decembro « ĉirun » (supo el avena faruno). Hodiaŭ ĝin Hima semas.

Ivan estas « riĉulo », ĉar li havas propran ĉevalon. Hima petas Ivanon, por ke li plugu lian bedon per sia ĉevalo. Ivan, bona viro, eliris matenfrue kaj post mallonga tempo plugis Himan bedon. (Por tiu laboro Hima devos manlabori ĉe Ivan). Nun Hima jam semis sian avenon. La bedo devas esti prierpita. Povus tion fari Ivana ĉevalo, sed Ivan devas ĝuste labori sur grafa kampo. Ja sinjoro grafo pagas eĉ 3 zl. potage por homa kaj ĉevala plentaga laboro.

Hima prenas dikan, kanaban ŝnuron. Ambaŭ finojn li firmligas al randoj de erpilo kaj ĉirkaŭita per ŝnuro iras antaŭen. Li mem erpas. Jes ! ne estas fabelo ! Polaj kamparanoj havas eĉ tiel « dolĉan » vivon.

Ciam erpilo forsaltas el bedo. Hima surmetas ŝtonon : unu, poste eĉ pli da ŝtonoj, sed nenio helpas. Fine Hima tre laciĝita revenas hejmen. Marino ! li vokas jam el malproksimo. Tuj eliras maldika, mizera virino. Ŝia aĝo estas vera enigmo. Eble ŝi estas ankoraŭ juna, ĉar — krom infano, rampanta ĉe ŝia jupo — ŝi estas ankaŭ graveda.

« Helpu al mi ! ĉar mi hodiaŭ devas priernpi bedon ! » krias Gima. La virino surmetas ian tukaĉon sur kapon kaj kaptante aeron per malfermita buŝo alkuras post sia edzo. Nun ili laboras kune.

Grafaj grenkampoj ĉirkaŭas ilin. Sinjoro grafo ĉi tie ne estas. Li loĝas en sia kastelo-palaco kaj ĝis 7 km ĉirkaŭe homoj kaj bestoj laboras por li. Hima kraĉas kolere, malbenas kaj daŭrigas sian laboron. Subite : « Helpu Dio » eksonas. Kamparano rekonas pastran voĉon. Li eĉ ne returniĝas. Kolere pensas : cia ĉevalo certe min pli helpus. Nur lia edzino humile pastron riverencas. Hima pli forte ektrenas erpilon. La pastro iris sian vojon. « Malhumila, impertinenta » pensis la pastro pri kamparano. Kaj Hima siaflanke murmuras tra la dentoj : « ci grafa hundo ; ci venis por flari ».

Ho ne mia karulo ! Eĉ tuta eminenta polico ne estas kapabla ekscii kion pensas pola « reakciema » kamparano.

ANIELA ĈERPIANKA.

(1) Temas pri subkarpata distrikto.

regi. Ĝi certe opinias, ke pola kamparanaro ne bezonas pli scipovi ol tralegi alvokon al impostoficejo aŭ juĝejo en okazo de nepago de ĉiuj impostoj aŭ faro de iu « krimo » kaj scipovi nur subskribi la pagordonon.

Certe pro tio niaj vilaĝanoj havas nur « unuklasejojn ». Tio ja ne estas ĝenerala instruado, sed ĝenerala malklereco ĉar al pola kamparanaro bona kaj senpaga instruado fakte tute ne ekzistas.

PROLETINO.

# LITERATURA PAĜO

## Virinmalliberejo

La malliberejа gardistino prenis la pezan ŝlosilfaskon, kiu pendis je la bendo de sia antaŭtuko k multe tintante malŝlosis la pordon.

« Bonvolu », ŝi diris, mok-invite movante la manon. La knabino faris du mallongajn hezitajn paŝojn antaŭen k tiam ekstaras. La pordo jam ree estis ŝlosita post ŝia dorso.

« Bonan tagon » ŝi diris mallaŭte.

« Bonvenon en la virinmalliberejo Barnimstrato » revoke sopranis knabina voĉo.

La alvenintino malrapide turnis sian kapon direkten de kie la vortoj estis sonintaj. La knabino kuŝis sur la dua, supra lito maldekstre. Ŝi havis nigran, buklan bubokapon, kiun ŝi apogis per siaj brakoj. Ŝi ridetis. Nun la novulino ĝin vidis : sur la plej multaj litoj, starantaj ambaŭflanke de la salonego, metitaj unu super la alia kuŝis junaj knabinoj k rigardis ŝin atente. Ankaŭ la du, kiuj sidis ĉe la tablo, sur kiun diverĝis trista lumo el kradrita fenestro. La novulino, sub la frapfajro de la rigardoj ju pli longe des pli multe sentis nervoziĝon. Ŝia rigardo glitis senhelpe laŭ la maldekstra litvico k revenis laŭ la alia flanko.

« Vi ĉiuj konfuzas ŝin per via rigardadaĉo », subite sonis alia voĉo tra la trankvilo. Ĝi sonis de dekstre, basiĝis kelkajn tonojn, fariĝis delikata.

« Nu, proksimiĝu iom » — ĝi plu parolis.

La novulino rigardis la knabinon. Ŝi estis ruĝblonda. Abrupte ŝi etendis siajn gambojn super la litrandon k saltis suben. Ŝi tiris benketon al si. Ŝia montra fingro signis. « Venu, venu — ŝi diris ankoraŭfoje. — ĝi estas por vi. »

La novulino per mallongaj, trotetaj paŝoj proksimiĝis al ŝi. Sidiĝis. Ŝiaj kurbaj, senhelpaj movoj montris, ke ŝia hezito ĉiam ankoraŭ estis singarda palpado pri nova situacio. La ruĝblonda metis sian manon sur ŝian kapon.

« Kiel do vi nomiĝas ? » ŝi demandis mildvoĉe.

Ĉiuj knabinoj nun staris ĉirkaŭ ŝi kun scivolemaj vizaĝoj. La ruĝblondino ŝajnis esti ilia parolilo.

« Hilde », diris la nova. Ŝi rigardis la okulojn de la alia. Ili havis verdecan brilon.

« Mi nomiĝas Else — tiu diris. — jen estas Luksi, Klara, Trudi... » Ŝia montra fingro rondcirklis, ĉe ĉiu nomo restante momenton enaere. Hilde svenetis pro la multaj nomoj.

« Kial vi efektive estas tie ĉi ? »

La demando venis el la rondo. Hilde ektimis dum momento. La renkonta, amikeca konduto de la ruĝblonda, la vizaĝoj, esprimantaj konsenton ĉirkaŭe, jen ĉio jam estis ĉarpentinta ponteton al ŝia koro. Kiaj ili aspektis... ja ĉiuj povus esti partianoj. Ŝi ankoraŭ konstante rigardis en la verdecajn okulojn antaŭ si. Kiel ŝi nomiĝas do ? Else, ĝuste, Else.

« Mi transportiĝis tien ĉi, ĉar mi partoprenis politikajn agadojn — ŝi informis ŝin. — Kaj vi ? » — (Else. Kiom efikas bona vorto ĝustmomente. Mi havas senton, kvazaŭ mi jam delonge konus Else-on).

« Politiko ? — laŭte vokis knabino. — Tiom stulta mi ne estas. Ĝi ja ne profitigas. »

Ridego kirliĝis el la rondo.

La okuloj de Hilde grandiĝas pro teruro. La bluo en ili alprenas flagran brilon. La rikanaj vortoj, la ridado starigis muron de glacieca misfido kontraŭ ŝi. « Tio estis granda eraro de mi, — ŝi riproĉis al si mem. — Kion do Frans ĉiam diris ? » Ŝi vidis lian vizaĝon klare antaŭ si. « Ĉiam misfidi. Neniam tuj montri viajn kartojn, se vi ankoraŭ ne konas la homojn tute. »

Kion jen ŝi diris, tiu Else ?

« Ni nome ĉiuj estas kriminalaj. »

Ŝia montra fingro denove ronde cirklis. La okuloj de Hilde sekvis mekanike.

« Jen, Luksi iom tro profunde rigardis en la monkeston de la drinkeja regaltablo, Klara ne povis lasi pendi la peltpalton de sia sinjoro... Trudi... » La voĉo de Else ekĉesas. Ŝi ridas.

« Daŭras tro longe citadi la mispaŝojn de tiuj germanaj junsinjorinoj — ŝi ridkveras. — Kostas tro multe da salivo al mi. »

Hilde nun atente observas la vizaĝojn de la knabinoj. Kiom oni povas erari per la eksterajo de homoj. Pri la nigrulino tie, jes, pri ŝi oni efektive povus kredi ĝin, kun la malbelaj trajtoj ĉe la buŝo. Ŝi ektimas el ŝiaj pensoj. Else frapetas ŝiajn ŝultrojn. « Sed tial nenia malamikeco. Venu, ni invitas vin tuj al la kafo... tio signifas, nur estas io por manĝi — ŝi rikanas — la servado tie ĉi ne estas konvena. »

Hilde baraktas. Sed ĝi ne sukcesas. Ili prenas ŝiajn brakojn k delikate puŝas ŝin al la tablo. Else sidiĝas apud ŝi. El ĉiuj eblaj anguloj la knabinoj ion aperigas, elpakas. Hilde sidas mire rigardante. Pecoj da kolbaso, fromaĝokrustoj, bulkoj, ĉokolado... Ĉio metiĝas meze sur la tablon. Else ŝovas la plej bonĝustajn pecojn al Hilde.

« Vi nun devas varmiĝi ĉe ni », ŝi diras kun plenigita buŝo.

Ankaŭ la aliaj knabinoj jen k jen ŝovas bongustan buŝplenon al Hilde. Ĉiuj traktas ŝin bone, ŝi sentas tion per la gestoj, per la vortoj, per kiuj ili ion etendas al ŝi. Pro tiuj ĉi palpeblaj pruvoj de kamaradeco ŝi iom post iom revarmiĝis. Kriminalaj ? Kion signifas kriminala ? Kiel Frans difinis ĝin ĉiam ? « La plej multajn ĝuste la kapitalisma socio faras kriminalaj. »

« Ne ĉiam ni vivas tiom bone — Else apud ŝi diras. — Multaj el ili ni havas familianojn, kiuj sendas ion al ni. Tio ĉe vi certe ankaŭ estas tiel, ĉu ? »

Hilde kapjesas. Abrupte ĉesas manĝi. Ŝiaj malesperaj gepatroj leviĝas antaŭ ŝia spirito. Ne ekpensi.

— Ĉu vi ĉiuj jam longe estas tie ĉi ? ŝi demandas.

— Kelkajn semajnojn, respondas Else.

Ŝi rigardas al Hilde fikse k esplore.

— Ĉu vi do malliberas unuafoje ?

— Jes.

— Tial vi ankoraŭ tiom embarasita... k krome ankoraŭ pro politiko ?... Kiel okazis tio ?

En Hilde tuj releviĝas misfido. Ŝi rigardas en la vizaĝon de la alia, kiu ne difinite interesita aspektas. Eble ŝi ĵus tiel demandis nur akcesore ? « Kiel do, — ŝi pensas, — plej gravas ne paroli pri detaloj. Ke mi estas komunisto, la polico ja scias. Pro tio mi ja estas tie ĉi. Kriminalaj ? Certe kun ili oni devas diskuti. »

« Vi ĵus mokis min pro mia politika laboro — komencas. — Rigardu, ni fine batalas ankaŭ por vi. La socia mizero ja estas kulpa, ke vi elglitis, ĉe multaj almenaŭ. »

Fariĝas longa konversacio. Else aŭskultas serioze, tiam k tiam demandas, kapjesas komprene. Hilde dum la interparolado fariĝas pli k pli entuziasma. Ŝi tute ne rimarkis, ke ĉirkaŭ ŝi la konversacioj jam delonge silentiĝis k ĉiuj aŭskultas ŝian « teorian rapidlecionon ». Ŝi nun ankaŭ rakontas, kiel ŝi estis arestita, ke neleĝaj gazetoj estis trovitaj ĉe ŝi. Varma sento pulsas tra ŝi, fariĝas pli k pli forta. Ankaŭ tie ĉi ŝi ne bezonos esti senutila. Ĉiutage ŝi diskutos kun la knabinoj.

Kiam fine ŝi ĉesas paroli estas ruĝeto sur ŝiaj vangoj k ŝiaj okuloj estas lumaj. Kial Else rigardas ŝin tiom enpense ? La knabinoj estas tiom nekutime trankvilaj. Kion ili do havas ? Jen Else metas la brakon sur ŝian ŝultron. Ŝi trenas Hilde-on de sur la seĝo, kun la baraktetanta knabino paŝas al la kradrita fenestro. La vizaĝo de Hilde estas silenta demando. Ĉiuj knabinoj sekvas ilin. Ili duoncirkle staras ĉirkaŭ ŝi. Else levas sian brakon. Ŝia montra fingro direktas sin tra la kradojn al la kontraŭa flanko de la malliberejа korto. La krepusko de la falanta vespero diskonturas la konstruaĵojn je griza, nebula maso. La fenestroj estas vicaro de lumaj punktoj, super kiuj ombras delikataj, regulaj strioj, la kradoj.

« Tie supre sidis Roza Luksemburg » diris Else.

Spire, kvazaŭ ĝemoj la vortoj sonas tra ŝiaj lipoj. Tiam sekvas morta silento. Jen la rondo de seriozaj knabinvizaĝoj, la grandaj, brilaj okuloj de Else. Estas solena momento, minuto de senbrua memorado...

« Vi scias... ? » Hilde demandas fine. La voĉo de Else sonas forte k firmdecide :

« Ni tion jam scias longe... longe... Ni ja ĉiuj, ĉiuj estas partianinoj. »

Ŝi firme rigardas en la vizaĝon de Hilde.

« Ni nur volis kontroli, kiu k kia vi estas... ili ja ankaŭ sendas spionojn tien ĉi, ĝuste al ni » ŝi diras.

Tiam Hilde ĉirkaŭbrakas la kolon de Else k per tio ŝi ĉirkaŭbrakas ĉiujn.

JAN PETERSEN.

*(El la nederlanda tradukis AR).*

## Abontarifo al " Sur Posteno "

| Lando | Mon-unuo | 6 ekz. | jarab. |
|---|---|---|---|
| Argentinio | p—p | 0.80 | 1.50 |
| Aŭstrio | ŝil | 1.10 | 2 |
| Belgio | belgo | 1.30 | 2.50 |
| Brazilio | milr | 2.80 | 5 |
| Britio | ŝil | 1/9 | 1/5 |
| Bulgario | levo | 30 | 50 |
| Ĉ. S. R. | kr. | 5 | 9 |
| Danio | kr. | 1.10 | 2 |
| Estonio | kr. | 0.65 | 1.25 |
| Finlando | mk. | 8.50 | 16 |
| Francio | fr. | 3 | 6 |
| Germanio | mkg. | 0.80 | 1.50 |
| Hispanio | pes. | 2.25 | 4 |
| Hungario | pengo | 1.10 | 2 |
| Japanio | jen | 0.80 | 1.50 |
| Jugoslavio | din. | 9.50 | 18 |
| Latvio | lat | 1.15 | 2 |
| Litovio | litas | 1.80 | 3.50 |
| Nederlando | g | 0.60 | 1 |
| Norvegio | kr. | 1.10 | 2 |
| Polio | zlot | 1.30 | 2.25 |
| Portugalio | esk | 3.70 | 7 |
| Rumanio | lej | 30 | 50 |
| Sovet-Unio | rub. | 1.60 | 3 |
| Svedio | kr. | 0.85 | 1.60 |
| Svisio | fr. | 0.95 | 1.80 |
| Usono | dolaro | 0.40 | 0.70 |

Ceteraj laŭ tarifo de Svisio

Abonpagon sendu per poŝtmandato al jena adreso : Jean Meynadier, Quartier de la Grotte des Fées, Le Gai Logis, Nimes (Gard), Francio.

Abonejo por Sovet-Unio : CK de SEU, Moskvo, Spiridonovka 15.

La abono validas nur post pago.

Neniam forgesu legeble skribi vian plenan adreson.